

**Retoriko, kun aparta konsidero al Esperanta Parolarto**, originale verkita en Esperanto de d-ro Ivo Lapenna. Formato 135 × 185 mm<sup>2</sup>; 220 paĝoj. Broŝurita. Prezo: 500 fr.fr., 10 ang. sil., aŭ \$ 1.50, aŭ egalvaloro, plus 10 % por sendkostoj. Mendebla ĉe ĉiuj pli gravaj Esperantaj libroservoj kaj librojoj aŭ rekte ĉe la aŭtoro: Prof. I. Lapenna, Paris 16, 33 Leconte de Lisle.

Jen nova pliriĉigo de nia originala literaturo! La aŭtoro ĝin dediĉas al la esperantista junularo. Antaŭparolon por ĝi skribis Reto Rossetti.

La unua parto de la libro traktas pri la lingvo, la instrumento de la oratoro, ĝenerale, pri ĝia ekesto (kaj la priaj teorioj), la faktoroj influantaj la lingvo-evoluon, la formiĝo de grandaj komunaj lingvoj, kaj pri la lingvo kiel ilo de pensado. La dua, kaj pligranda parto, portas la titolon: „Retoriko”, kaj traktas pri elokventeco kaj retoriko, pri la fizikaj ecoj de la oratoro (liaj aspekto, voĉo, gestoj, vestaĵo), pri liaj intelektaj kaj moralaj ecoj, pri la publiko, kaj pri la parolado mem.

Finas la libron 20-paĝa aldono konsistanta el kvar paroladoj kun ties analizo.

Antaŭnelonge mi aŭdis paroladon de prof-o Lapenna en Amsterdam, kaj konstatis ke li same brile oratoras, kiel li verkis sian libron. Ĉi tiu libro enhavas, precipe en sia unua parto, multon interesan ne nur por oratoroj kaj tiuj kiuj esperas fariĝi oratoro, sed por ĉiuj seriozaj esperantistoj entute. Profesoro Lapenna ne ĉesas emfazi la superecon de la esprimilo kaj pensilo pri kiu ni, esperantistoj, disponas, kaj li insistadas ke ni kulturu ĝin, ne malgrandigu ĝian valoron per stulta insistado pri ĝia artefariteco. Ja la naciaj kulturilingvoj ne estas malpli artefaritaj, kaj tiu artefarado de kulturilingvoj ankoraŭ hodiaŭ okazas (ekz. en Hindujo, en Indonezio, en Jugoslavuja Makedonio). Lingvo estas socia, ne biologia, kaj do ne „natura” fenomeno. Se tamen oni volas paroli pri „natureco”, do tia lingvo estu nomata pli natura, kiun posedi estas pli facile, kiu estas pli fleksebla instrumento por nia pensado kaj interkomunikiĝado. En tiu senco Esperanto sendube estas pli natura ol kiu ajn tiel nomata natura lingvo.

Mi finu per unu citaĵo el ĉi tiu libro, citaĵo kiun mi plene subskribas:

„La scio de la Internacia Lingvo devas esti adekvata al tiu de la gepatra literatura lingvo. La ĝenerala kulturo kaj la speciala klereco de ĉiu persono parolanta Esperanton, devas respeguliĝi en la I.L. proksimume same tiel, kiel ĝi respeguliĝas en la gepatra lingvo. Ĝi estas unu el la antaŭkondiĉoj de bona, grandkala evoluo de la esperantlingva parolarto! ..... oni povas kaj devas postuli, ke ĉiu unuopa esperantisto sciu aŭ klopodu scii la Internacian Lingvon same bone, kiel sian propran gepatran lingvon. Ĉar ĝi ne estas „fremda” en la ordinara senco de la vorto. Por la esperantistoj ĝi devas esti same tiom — se ne same tiel — kara kaj proksima, kiom la hejma dialekto aŭ la gepatra literatura lingvo.”

Preseraroj ne estas multaj. Sur paĝoj 23-25 la aŭtoro trifoje parolas pri „linia” lingvo, kaj mi devas konfesi ke mi ne komprenas la liniecon, eĉ se la kunteksto ne lasas dubon pri tio, ke temas pri mana aŭ gesta lingvo.

**Historio de Yukawa Teorio**, verkis kaj eldonis: Esperanto-Rondo en Naturscienca Fakultato de la Universitato de Osaka, Japanujo. Formato 127 × 181 mm<sup>2</sup>; 25 paĝoj.

Ĉi tiu broŝuro enhavas antaŭparolon, tripaĝan artikolon de prof-o Egami, la japana delegito de ISAE, pri „Scienco kaj Esperanto”, dum la cetero de la broŝuro traktas la naskiĝon kaj disvolviĝon de la mezontorio de prof-o d-ro Yukawa, kiu la 10an de decembro 1949 ricevis la Nobel-premion por fiziko. La verkintoj sukcesis por nefakuloj iom klarigi la disvolviĝon de la atomkerna fiziko, kaj tial sendube meritas komplimenton, kiel ankaŭ pro ĉi tiu eldono entute.

Necesas, tamen, fari kelkajn prilingvajn rimarkojn. „Neŭtona” por „Newton-a” estas malrekomendinda. Se oni skribas „Newton-a”, la leganto estas libera legi „Njutona”, kaj ne bezonas iom malfacile trovi la vojon al la kompreno ke temas pri la angla fizikisto Newton. Molekuloj, atomoj kaj pli malgrandaj eroj ne apartenas al la mikroskopa mondo, ĉar per mikroskopo ili ne estas videblaj. Oni prefere parolu pri mikromondo. „Kosmradioj” estas vorto fakte neprononcebla. Oni diru „kosmaj radioj”. „Senrezona” (p. 11) supozeble misrolas kiel traduko de la angla „unreasonable”; „senbaza” ŝajnas pli taŭga. „Formuligo” estu „formulado”. „Malakordaj unu la alian” estu „reciproke malakordaj” (p. 12). „Efekto” (p. 14) ne estu uzata en Esperanto por esprimi „efikon” aŭ „fenomenon”. „Teorifizikisto” kaj „teorifizik-grupo” monstre impresas min, precipe la lasta vorto.

„La teorie kalkulita valoro estis de la grado de 10<sup>-8</sup> sekundo”. Ĉu preseraro por *grado*? Alie oni uzu prefere la internacian vorton „ordo”. „Kontraŭstaro” (p. 15) estu „malakordo” aŭ io simila. Cetere sufiĉe ofte la aŭtoroj uzis it-participon anstataŭ at-participon, ekz. (p. 9) „estis trovita”, (p. 15) „esti atendita”, dum (p. 19) „estas progresita” devas esti „estas progresinta”.

408.92(075.4) = 393

C. B. Zondervan: **Vortoj kaj Esprimoj por Komencantoj**. Eldono de J. Muusses, Purmerend. Formato: 133 × 194 mm<sup>2</sup>. 70 paĝoj. Prezo / 1,15. Kio celas esti „*Esperanto in der Tasche*” (vidu la recenzon en Scienca Revuo 2 114) por germanlingvanoj, tio evidente ĉi tiu libreto volas esti por nederlandlingvaj komencantoj. Bedaŭrinde ĝi denove montras, kiom necese estas ke ne nur esperantaj literaturaĵoj kaj sciencaj verkaĵoj, sed ankaŭ lernolibroj kaj vortaroj, ktp. estu kontrolataj kaj kritikataj de aliaj, kompetentaj esperantistoj, prefere ankaŭ de alilingvanoj. Mi opinias ke la kritikindaĵoj en ĉi tiu libreto estas tro multaj, eĉ se multaj el ili ne estas tre gravaj.

Mi nur volas diri ĉi tie, ke, se ĉi tiu libreto ĝisvivos duan eldonon, ĝin ne ankoraŭ makulu trifoja misuzo de „ne ankoraŭ” por „ankoraŭ ne”! Kaj ankaŭ la aliaj maltrafaĵoj tiam estu malaperintaj.

575/576(023)

„La nuna stato de l' evoluismo” de Jean Rostand. Eldonis SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo. El la franca tradukis J. kaj M. Delacourt. 114 paĝoj, formato 13 × 20 cm<sup>2</sup>. Prezo: broŝurita \$ 0.70, tole bindita \$ 0.85. Recenzo sekvas.